Kolego Minnaja konfirmis la luon de la salono en Grand Hotel (RSM) por la vendreda programo de la studadsesio. Aranĝis ĝin la mastrumantoj de la grupo de subtenaj membroj el San Marino OProf. Grego kaj HMdAIS Marina Michelotti SMdAIS. La senato akceptis, ke la luprezo je ĉ. 250.000 liroj pagota de tiu grupo estu konsiderata kiel ĝia membrokotizo kaj la resta sumo - kiel simbolaj kotizoj en 1997 por ĝiaj sciencaj membroj. Por ebligi tion nepre necesas fakturo de la hotelo.

Ĉar la konto de la grupo de la sanmarinaj subtenaj membroj troviĝas ekster la administra influo de la trezoristo de AIS, necesas ĉiujara interparolo inter reprezentantoj de ambaŭ flankoj. Pro la rifuzo de kolego Frank kiel vicdirektoro kaj nunura ĉestanta membro de la FinO pritrakti tion, tiu punkto restis en ŝvaba stato.

Kolegino Lewoc sciigis, ke la retiriĝinta kandidato Meurer postulas repagon de la restaj 200,-- DEM el 500,-- DEM antaŭpagitaj por ekzameno, alikaze li turniĝos al juĝejo.

Interparole kun la trezoristo la prezidanto estis konsiderinta tiun restan sumon kiel kompenson por la administraj kostoj.

Kolego Quednau atentigis pri la teknikaj malfacilaĵoj por anoj el kelkaj landoj reguligi siajn AIS-kotizojn. Kolego Frank inklinas instigi al unufoja anecpago (dumviva membreco), kio tamen ofte ne estas aplikebla, ĉar la pagenda sumo superas kelkfoje monatan salajron en tiuj landoj. La senato atentigis, ke la kotizoj estas pageblaj ankaŭ pere de

landaj grupiĝoj, pere de UEA-konto, utiligante la Fonduson Klemm aŭ eĉ per internaciaj respondkuponoj.

De ISKano A. Grzebowski, prezidanto de "Monda Turismo" (MT, klerigejo de AIS en Pollando), venis la propono destini parton de la enspezoj de AIS, atingitaj dank' al funkciado de la klerigejo en Bydgoszcz, por aĉeti por tiu klerigejo novan, modernan komputilon. Temas pri la sumo de 17,00 AKU de studentiĝkotizoj kolektitaj en Bydgoszcz en la studadjaro 1996/97 kiuj preskaŭ precize kovras la pagendan sumon. MT antaŭvidis uzadon de tiu komputilo ĉefe por grafikaj laboroj kaj kompostado (ankaŭ por AIS mem, laŭ aparte interkonsenteblaj kondiĉoj) kaj por retkonektoj por siaj gestudentoj. MT petis ankaŭ eventuale decidi, ke studentiĝ-kotizoj kolektotaj en sekvaj studjaroj estu elspezitaj similcele, laŭ decidoj de la Program-Konsilio de la klerigejo. MT ne akceptis la proponon de la prezidanto transpreni la malnovan, sed ja taŭgan komputilon el la prezidanta buroo en Paderborn. La senato ne aprobis tiujn petojn, kun unu kontraŭvoĉo kaj 7 sindetenoj decidis prokrasti decidon rilate al komputilo.

Kolego Frank strebas al laŭeble multaj dumvivaj membroj (sciencaj kaj subtenaj) kaj volas por ili presigi dorsflanke sur la konfirmo pri ilia aneco mencion de iliaj rajtoj.

3. *Honorad-ofico / HordO (Maitzen, Tyblewski)*
Similie kiel lastjare la senato decidis, ke dum la inaŭguro de la 18a SUS okazu festa parolo en la Latina, prezentita de partoprenanto en la latina simpozio s-ro Vido Angelino (kun posta resuma traduko ILen). Symposium Latinum okazis dum SUS18 enkadre de la humanistika sekcio.

Al la senato alvenis tri proponoj por la Premio Pirlot. Post vigla diskuto la senatanoj decidis aljuĝi la premion por la jaro 1997 al OProf. Carlo Minnaja por la vortaro "Vocabulario Italiano-Esperanto" aperinta ĉe CoEdEs en 1996.

Dum la sesio evidentiĝis, ke ankaŭ OProf. de Smet liveris sian verkon por la Premio Pirlot, kiu ne estis prezentebla surloke pro la malĝusta alsendadreso de la aŭtoro. La senato decidis, ke ĝi estu konsiderota dum la venontajara konkurso.

4. *Identec-ofico / IdeO (Frank, Tyblewski)*
Ĝis la limdato je la nuna senatkunsido ne venis de la prezidanto de AsAIS OProf. Kuznecov al la senato klarigo pri la nova ituacio de AsAIS kaj reago al la letero de la AIS-prezidanto.

El tio la senato konkludis, ke la informoj ricevitaj dum la lasta senatkunsido en Freising konfirmiĝis (grava status- kaj statutŝanĝo de AsAIS kun la sekvo, ke AsAIS ne plu respondas al la interkonsento kun AIS San Marino i.a. pro paralela uzado de alia nomo, forigo de ILo kiel ĝia oficiala lingvo, fondo de konkurenca al AIS asocio).

Tial la senato post la komenca suspendo ekde tuj nuligis la rilatojn al AsAIS, ne plu konsideras AsAIS kiel sian landan aŭ regionan grupon, ne plu ebligas adaptajn adoptojn de diplomoj de AsAIS, se la ekzameno okazis post 18.01.1997, kaj malaprobas iujn agadojn de AsAIS en la nomo de AIS aŭ menciante kunlaboron kun AIS.

La prezidanto proponis diskuti dum la Akademia Forumo de la 18a sesio pri la ekesto kaj celoj de AIS.

5. *Inform-ofico / InfO (Fössmeier, Maitzen)*
Kolego Fössmeier proponis realigi simpoziojn kun difinita temo, eventuale sub la nomo "fokusoj", iniciatitajn de docento, dum kiu prelegantaro povas konsisti eĉ el studentoj, kaj kies temo estu aparte alloga kaj pli aktivigu aŭskultantojn. Per tiaj simpozioj estu ankaŭ akireblaj AIS-studunuoj. La senato forte subtenis tiun proponon.

Ankaŭ lia propono kontrakti kun organizantoj de tempe proksimaj al SUS-aranĝoj, kiel ekz. ĉijare la Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Assisi (I) kaj la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista de UEA en Romo/Rimini (I), trovis larĝan aprobon de la senatanoj. La celo estas popularigo de la AIS-agado, pliriĉigo de la sesioj kaj aktivigo de interesitoj, kiuj jam posedas almenaŭ bazajn lingvokonojn de la internacia lingvo. Li proponis, ke por partoprenantoj de tiuj aranĝoj validu la baza aliĝkotizo sen aldona tiukaze malfruiĝkotizo, eĉ por surloka aliĝo. Kompense la organizantoj de la eksteraj aranĝoj varbu por nia studadsesio. Kolego Fössmeier ricevis de la senato la rajton tiel kontrakti.

La senato de AIS jam en Freising (marto 1997) akceptis la ellaboritan en Prago 1996 kontrakton inter la Universala Esperanto-Asocio kaj AIS; UEA aprobis ĝin en aprilo 1997, kun aldono de 12a punkto. La AIS-senato aprobis la tiel ŝanĝitan version de la kontrakto. Subskribante ĝin la prezidanto aldonu peton pri frua informado de la anoj de la reciprokaj organizaĵoj almenaŭ pri iliaj ĉefaj aranĝoj (UK/UEA kaj (prov)SUS/AIS) kaj ĉiukaze pri iliaj komunaj aranĝoj dum IKU. La informoj pri ili liveru komisiitoj de la asocioj.

Kolego Fössmeier disdonis al la senatanoj surdiskede la akutalan version de ISD kun la nova serĉsistemo.

Malgraŭ ne klara financa stato ĉe AIS de kelkaj anoj, kolegoj Holdgrün kaj Quednau protestis kontraŭ arbitra eksigo de ili el la Akademio se ili ne kulpas pri tiu stato aŭ antaŭ ol oni klarigu la situacion.

Konsiderinte tion la senato priparolis detalojn koncerne la "Internacian Sciencistan Dokumentaron", i.a. la liston de restantaj membroj el San Marino atentante, ke en la aktuala eldono de ISD troviĝu almenaŭ la kerno de la sanmarina grupo, ekz. la honora senatanino Morganti, honora membro de AIS Michelotti, OProf. Grego kaj ISKano Polerani.

Al la historia parto de la eldonota libroforma dokumentaro de AIS estu aldonitaj oficialaj dokumentoj el la tempoj de la fondo de la Akademio kaj ankaŭ ĉiuj subskribitaj ĝis nun kontraktoj.

Tiu dokumentaro de AIS estu presota ĝis la fino de 1997. La nuna LaTeĤ-dosiero el Paderborn estu sendota al kolego Fössmeier de kolego Frank. Ĉiuj dekanoj lastfoje kontrolu, ĉu ISD estas en aktuala stato, kaj ili sciigu la ŝanĝendaĵojn. La redaktadon de ISD transprenis kolego Fössmeier. Plej malfrue ĝis fino de oktobro estu liveritaj al li ĉiuj koncernaj sciigendaĵoj por la nova eldono. Post la kompletigo per novaj aliĝoj, eksigoj kaj eksiĝoj, rangoplialtigoj, sciigitaj aktualigoj kaj korektendaĵoj la redaktoro sendos al Paderborn por nura elpresigo la finpretigitan dvi-dosieron.

Kolego Fössmeier raportis, ke kontaktoj al la Fondaĵo Lapenna estis ĝis nun senfruktaj, de la komisiito por ili ADoc. Uruena ne venis reagoj. ADoc. Klaus Perko dr., juristo el Aŭstrio kaj prezidanto de la Fondaĵo Lapenna, invitita kiel gasto al la senatkunsido informis pri la nuna situacio kaj la celoj de la fondota Instituto Ivo Lapenna (aŭ Asocio Ivo Lapenna) kun sciencaj taskoj, kaj pri nepre de ĝi distingenda Fondaĵo Lapenna (i.a. gardo de memoro, provizado de la Instituto per monsumoj). La Instituton Lapenna jam subtenas kelkaj AISanoj (prof-oj Kiselman, Minnaja, Tyblewski).

Petate subteni la starigadon de la Instituto la senato sugestis renkontiĝon de ĝiaj fondantoj dum unu el la venontjaraj AIS-aranĝoj, ekzemple en februaro en Paderborn, dum la provSUS en Moskvo en marto aŭ dum la SUS en Rimini/San Marino septembre. AIS estu ĝustatempe informita pri eventuala akcepto de tiu propono. Dume ĉiuj flankoj intertraktu pri eblaj kunlaborformoj (AIS ekz. proponas gastigadon similan al tiu, kiu jam okazadas por la latinistoj dum SUS, aŭ kurson dediĉitan al Lapenna).

Malgraŭ la ĝis nun ne esperigaj spertoj (pro manko de vera interesiĝo kaj fidinda partnero) ekzistas la ebleco aktivigi kontaktojn de AIS en Kubo pere de la dumviva ISKano Luttermann. Li pasigis en Kubo du monatojn i.a. partoprenante la seminarion pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko (SAEST).

Rilate la eldonserion "Acta Sanmarinensia" la respondeca senatano Fössmeier emfazis konfuziĝon pro la jam aperintaj kajeroj de ĝia kvara kaj kvina volumoj publikigitaj de la eldonejo "Libro", malgraŭ ke ankoraŭ ne estas kompletigita la tria volumo.

Kolego Tyblewski bedaŭrinde ne respondis koncernajn leterojn kaj ne plu sendis la antaŭpagitajn librojn. La senato denove substrekas, ke Acta Sanmarinensia estas eldonaĵo de la Akademio, pri kiu decidas la senato, kaj kontrakto pri nova volumo estas pritraktenda kun la direktoro de la InfO, kiu ekde 1996 respondecas pri la aperigado. La senato rememorigis, ke kajeroj de Acta enhavu i.a. tekstojn de SUS-kursoj de efektivaj membroj (sub propra respondeco) aŭ de kunmetitaj SUS-prelegoj kun aprobo de la koncerna dekano; unuopa kajero ampleksu inter 16 ĝis 64 paĝojn.

Kolego Frank sendos la preparitajn antaŭ jaroj kovrilpaĝojn por la tria volumo de la Acta al kolego Fössmeier.

La senato rekomendis ĉeeston de kolego Fössmeier ĉe la membrarkunsido de la Akademia Libroservo, kiun kunordigas kolegino Lewoc. Ĝi okazis dum la 18a SUS, laŭprograme la 3an de septembro ekde 18:00 h.

Kolego Quednau raportis pri la financaj problemoj en Debrecen (H), kie li estis antaŭ kelkaj semajnoj. Ankaŭ pere de ISKano Zvara el Poprad (SK) li informis, ke oni strebas tie al pli granda agnosko ol la ĝisnuna.

Kolego Minnaja proponis disvastigadi informojn pri la agadoj de AIS pere de la Itala Esperanto-Instituto (por Italio) kaj en junularaj esperantistaj aranĝoj, kie li esperas havi pozitivan resonancon. Li mem intencas diskonigi la AIS-agadon en rondoj de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), dum kies venontjara kongreso li prelegos. Al TEJO apartenas esperantistaj gejunuloj ĝis aĝo de ĉ. 30 jaroj.

Kolego Minnaja pledis ankaŭ por informa servo al la sanmarina gazetaro, kiu almenaŭ ĉiumonate sendu itallingvan sciigon pri la agadoj de la Aka-

demio, kaj por persono, kiu kontrolu aperadon de tiuj informoj kaj komuniku tion al la senato. Li mem pretas surpreni la unuan taskon, kondiĉe ke li ricevos faksnumerojn de la gazetaj redakcioj kaj rekompencon de la elspezoj. Estus utile sciigi periode (ekz. trifoje jare) pri AIS kaj pri ĝiaj ankaŭ eksterlandaj aranĝoj ĉiujn parlamentanojn de RSM (60), universitaton, bibliotekon kaj turisman entreprenon. Krome indus sendi similajn informojn al la ambasadejoj de la landoj kie ni agas.

Kolego Minnaja refoje petas, por eviti komunikadproblemojn inter senatanoj, pri la aktiva uzo de la momente plej rapida kaj efika komunikkanalo, kiu estas la elektronika reto.

6. *Klerig-ofico / KleO (Quednau, Fössmeier)*

La senato aprobis, ke aldone al la kursoj jam akceptitaj laŭ la SUS18-programo la jenaj ankaŭ validu kiel SUS-kursoj:
sekcio 1: kurso pri streso de AProf. von Kauffmann kaj Bac. Cisteian (kun du sindetenoj), sekcio 2: "Ĉefaj tendencoj en rusa kaj franca dramverkaroj" de AProf. Korĵenevskaja (kun 2 sindetenoj).

La senato akceptis ankaŭ du ILo-kursojn de ISKanino Tuhvatulina (por partoprenantoj sen kaj kun antaŭkonoj), sen formala voĉdonado.

La senato kun kontento eksciis pri pliampleksiĝado de la interreta oferto pri la kursoj de AIS (ekz. pri klerigkibernetiko, informaciestetiko, interlingvistiko), kio klare montras la malcentran agadon de AIS. Ankaŭ kolego Fössmeier ĵus preparas sian unuan kurson atingeblan per la elektronika reto.

Kolego Quednau substrekis, ke por ĉiuj kursoj el la instruteko (libro, video, CD-ROM, internet) validas: se ne efektiva membro, tiam la dekano de la koncerna sekcio decidas, ĉu la ofertata kurso estas taŭga. Tiu persono ankaŭ respondecas pri aktualigado de la kurso aŭ - kaze de malaktualiĝo - pri ĝia nuligo. Kaze de morto de kursaŭtoro, la kurso estos nuligita, se ne dekano aŭ alia respondeculo daŭrigos ĝin.

La direktoro de la KleO atendas rapidan alsendon de ĉiuj studadsesiaj kaj SUSaj kursoj okazintaj en Paderborn (D), Berlin (D), Nitra (SK), Pollando kaj Rumanio. Li petis ankaŭ informojn pri studadplanoj evoluigataj de AIS, ankaŭ tiuj en kunlaboro kun aliaj institucioj, kun kiuj AIS havas validan kontrakton. Kolego Quednau emfazis, ke ĉiuj kursoj el eksterSUSaj studadsesioj validas kiel studunuoj ĉe AIS nur, se la sesio plenumis la kondiĉojn de la "Regularo pri studadsesioj ekster SUS".

Alikaze ĝi estas rigardata kiel privata aranĝo.

Por la administraj celoj kaj fidinda informado pri la AIS-kursaro la KleO ricevu informojn pri titolo de kurso, nomo de la gvidanto, preleglingvo (ankaŭ ĉe eventuala traduko), kursamplekso en studunuoj, dato, loko de la koncerna studadsesio. Por la interretaj kursoj estas aldone menciendaj de la kursrespondeculo ekzameneblecoj, kursamplekso en studunuoj kaj la elektronika adreso, per kiu la kurso estas atingebla.

Dum Bakalaŭrigaj Universitataj Sesioj povas okazi paralele al BUS-kursoj ankaŭ tiaj, kiuj ne plenumas la kriteriojn de BUS-kurso (ekz. en la loka lingvo de lokaj profesoroj). La senato aprobis, ke ili validu kiel normalaj studadsesiaj kursoj.

El la AIS-klerigejo "Monda Turismo" el Bydgoszcz (PL) venis peto liveri al ili studadplanon pri turismiko, kulturscienco, profesia instruado de esperanto kaj pri eŭrologio.

Kolego Tyblewski estis siatempe taskigita prepari la studadplanon pri turismiko, kiu bedaŭrinde ĝis nun ankoraŭ ne ekzistas en fina versio. La senato proponis, ke kolego Grzebowski havigu al kolegoj Quednau kaj Tyblewski mem ellaboritan skizon de studplano. La lasta rapide pritaksu ĝin. Se tio ne okazos, la senato turniĝos kun la sama peto al alia fakulo.

Kolego Frank opiniis, ke por studadplano pri kulturscienco kaj pri profesia instruado ankoraŭ ne maturiĝis la tempo; en la dua fako la nura instruado de Esperanto ne povas konsistigi studadcelon. En projektado de koncernaj studadplanoj oni petu helpon de ADoc. Koutny kaj PDoc. Barandovska-Frank, kiuj serĉu ankaŭ aliajn fakulojn. Dume kunordigu kaj pritraktu tion la dekano de la dua sekcio.

Dum la Novembra Renkontiĝo kaj la venonta germana studadsesio en Paderborn (D) en februaro 1998 estu ellaborita studadplano pri eŭrologio. Ĉiu senatano povas ricevi la jam ekzistantajn pri tio protokolojn kaj estas invitata al kunlaboro. La rezulto estu prezentita kaj pridiskutata dum la venonta senatkunsido.

La pola klerigejo en Bydgoszcz (PL) intencas okazigi je 25.4-3.5.1998 BUS-on, kion la senato akceptis. Krome de tie venis la propono organizi SUS-on je 1.5.-9.5.1999, kio principe estus akceptebla flanke de la senato. La senato rekomendis tamen konsideri pli taŭgan tempointervalon (ekz. en marto, dum Pasko aŭ pentekostaj ferioj), ĉar dum la antaŭvidita tempo okazos alilande regula

universitata instruado kaj studado, kio verŝajne ekskludos partoprenantojn el tiuj landoj.

7. *Protokol-ofico / ProtO (Lewoc, Holdgrün)*

La senato akceptis kun etaj ŝanĝoj la protokolon de sia 33a kunsido. Apendice troviĝas la regularo pri studadsesioj ekster SUS en la formo akceptita de la senato.

Kolego Frank petis pri distribuo de propono de la senatprotokoloj ene de 3 semajnoj post la kunsido. Se la ProtO ne povos dissendi ilin en tiu tempo, tiam proponon prezentu la prezidanto ene de du semajnoj. La senatanoj disponu pri du semajnoj por eventualaj ŝanĝpetoj.

La apudmoskvan studadsesion de AIS kun rango de provSUS, okazontan en marto 1998 en la konstruaĵo de la rusa akademio de sciencoj organizas OProf. Wickström (komisiita de la senato) kaj ADoc. Rudakova (surloke). Ekzistas la ebleco antaŭ aŭ post la provSUS malmultekoste pasigi kelkajn tagojn en Moskvo. Aliĝilo por tiu sesio kun pli detalaj sciigoj estas jam havebla ĉe la senata sekretario kaj en la reto. La interesitoj post plenigo sendu ĝin al kolegino Lewoc. Ĉambroj estas mendeblaj sub la retadreso de la organizantoj: psusru@wiwi.hu-berlin.de.

Kolegino Lewoc jam distribuas aliĝilojn ankaŭ por SUS19 lige al la 4a itala studadsesio, kiuj estis riceveblaj dum la 18a SUS mem. Ŝi petis rapidan sciigon pri ofertoj de kursoj kaj prelegoj por ambaŭ sesioj. La dekanoj instigu ankaŭ aliajn efektivajn membrojn el sia sekcio; ju pli frue ŝi ricevos enprogrameblajn kontribuaĵojn despli rapide estos starigebla kaj disvastigebla la fina programo por la sesioj.

La limdato por la anonciĝo por kursoj kaj prelegoj por la 19a SUS estas 28.03.1998 kaj por la venontjara provSUS: 20.10.1997.

Por pli intensa kaj frua informado kaj varbado por la SUSoj en 1998 la senato kontente aprobis planon de ProtO aldoni:

(1) aliĝilojn por ambaŭ sesioj kun eventuala programskizo pri SUS19 kaj programo por la provSUS (se ĝis tiam alvenos sufiĉe da kontribuoj) al la jarfina cirkulero (do al ĉiuj apartenantoj de AIS); ProtO aldone distribuos tiujn informojn al iamaj interesiĝintoj ekster AIS;

(2) provizoran programon de SUS19 al la unua grkg-kajero/marto 1998, do al la subtenaj membroj, filioj, klerigejoj; kolego Frank volas distribui ĝin ankaŭ al dumvivaj ISKanoj; ProtO: al ceteraj aliĝintoj kaj al interesiĝintoj de la lastaj jaroj ekster SubM;

(3) finan programon de SUS19 al la dua kajero de grkg/junio 1998 (al aliĝintaj subtenaj membroj); ProtO: al la ceteraj aliĝintoj.

La ProtO kune kun la InfO pripensu, kiel plej efike disvastigi informojn pri AIS kaj pri SUSoj. Kolegino Lewoc jam proponis, sekve de la kontrakto inter AIS kaj UEA, ke AIS aldonu al sia jarfina cirkulero UEA-informojn pri Universalaj Kongresoj kaj UEA agu simile kunsendante (prov)SUS-aliĝilojn de AIS kun ĝiaj unuaj bultenoj pri UK al siaj anoj.

8. *Prezidanta ofico / PrezO (Frank)*

Rezulte de sekcikunsidoj okazintaj dum la 18a SUS tri sekcioj turniĝis al la senato kun peto alvoki: en la kibernetika sekcio ADoc. Baber (D) al AProf., en la humanistika sekcio s-ron Migoń (PL) al AProf. (en la fako kulturscienco), en la natursciencа sekcio PDoc. Kordylewski (USA/PL) al AProf. (en la fako ĉelbiologio) kaj ISKanon Rudnicki (PL) al OProf. (en la fako astronomio).

La senato unuanime aprobis la proponojn. La dekanoj de la koncernaj sekcioj sendu al la prezidanto alvokoproponon skribitan de plenrajta membro kaj reliefigantan la alvokoindecon. La prezidanto kontrolu la plenumitecon de la alvokokondiĉoj.

La senato rekomendis al la komisiita direktoro de la Arta Sektoro ekscii, ĉu s-ro G. Silfer pretas fariĝi docento en la Arta Sektoro.

9. *Scienc-ofico / SciO (Minnaja, Holdgrün)*

Kolego Minnaja amplekse prezentis la historian bazon kaj kelkajn dokumentojn klarigante la fonon de kaj sekvojn al la nuna agado de la Akademio. Sekvis vigla diskuto pri la esenco kaj estonteco de AIS.

La senato aprobis proponon de kolego Minnaja registrigi AIS-on ĉe la Tribunalo en RSM laŭ la nova leĝo, se por ĝi maksimumue unufoje estas pagenda ĉ. 1000,- DEM. Pri tio estas preparenda buĝeto. Kolego Minnaja esploru detalojn kaj laŭnecese elektu taŭgan advokaton.

La poŝta adreso de AIS en San Marino ŝanĝiĝis. La poŝtkesto de AIS ne plu estas n-ro "111" en San Marino Città, sed n-ro "33" en Domagnano (RSM), kiun regule malplenigos s-ro Mark Sammaritani, filo de SMdAIS Sammaritani-Heuer. Ekde nun tie

estu la fiksa sidejo de AIS. La prezidanto forte subtenas kunlaboron kun s-ro Sammaritani, kiu - loĝante en San Marino - helpu surloke aranĝi aferojn, fari varban kampanjon en RSM i.a. en la gazetaro k.s. Por tio estos pagenda precizigenda sumo, kiun laŭnecese pretas private transpreni kolego Frank, se ĝi ne estos tro malmodera.

Kolego Quednau raportis, ke la Lexicon Silvestre nun estas alirebla per la interreto sub la paĝoj pri lia katedro kiel unua paŝo al ĝia oficialigo.

10. *Struktur-ofico / StukO (Tyblewski, Maitzen)*

En majo 1997 dum la unua BUS en Bydgoszcz (PL) estas transdonita de la rektoro de la Ŝtata Geologiesplora Akademio (ŜGA) en Moskvo s-ro L. Grabĉak pere de ties komisiito V. Komaŝĉenko propono pri interkonsento inter AIS kaj ŜGA. La senato post kelkaj ŝanĝoj kaj kun aldonenda modelo de la registro akceptis ĝin kun unu sindeteno. Surbaze de ĝi ĉe ŜGA povas okazi registrado de akiritaj ĉe AIS sciencaj gradoj kaj tial ne plu ekzistas obstakloj okazigi la planitan por marto 1998 studadsesion apud Moskvo (RUS) kiel provSUS.

La senato eksciis, ke en Pollando antaŭ ne longe estas fondita dua asocio, kiu intencas transpreni taskojn de landa subtena grupiĝo de AIS. Apud la unua, aranĝita de ISKano Soczówka, temas pri tiu fondita de ADoc. Galor. La senato ĝojas pri sentebla aktiveco en la lando, kie AIS unue eksterlande eklaboris, kaj ankaŭ samkondiĉe kiel la unuan provizore agnoskis la duan asocion (mankas ankoraŭ originala dokumento de fondo kun membrolisto kaj statuto). La senato tamen forte rekomendis unuiĝon de ambaŭ grupoj, por ke ili povu konkorde revivigi la polan filion de AIS.

11. *Vicprezidanta ofico / VicO (Pennacchietti)*

Kolego Pennacchietti petis la senatan sekretarion sendi pripersonajn informilojn al personoj laŭ la transdonita de li listo.

12. *Diversaĵoj*

La venonta senatkunsido okazu ĉ. 18a--19a de februaro 1998 en Paderborn (D). La precizan daton la prezidanto sciigos en oktobro (unu sindeteno).

Protokolis: *Joanna Lewoc, Horst S. Holdgrün*
(protokol-ofico)

Stato je *25.9.1997*

Protokoll
zur Mitgliederversammlung der AIS Deutschland e. V. Deutsches Institut der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino

am Sonntag, 23. November 1997 in Paderborn, Gästehaus der Universität.

Beginn: 9.30 Uhr, Ende: 12.25 Uhr. Teilnehmer gemäß Anwesenheitsliste; vertretene Institutionen: Gesellschaft für sprachgrenzübergreifende europäische Verständigung (Europa Klub) e. V. durch ihren Präsidenten und Institut für Kybernetik Berlin e. V./Gesellschaft für Kommunikationskybernetik durch ihren stv. Vorsitzenden, Prof. on. Dr. Siegfried Piotrowski. - Leitung: Prof. Dr. habil. Helmar G. Frank, Paderborn (Vorsitzender), Protokoll: Siegfried Piotrowski, Hagen (Mitglied des Vorstandes).

Die Beschlußfähigkeit wurde nicht angezweifelt. Alle Anwesenden waren als effektive oder Fördermitglieder stimmberechtigt.

Die Tagesordnung wurde entsprechend der form- und fristgemäß erfolgten Einladung vom 16. Oktober 1997 ohne Gegenstimmen angenommen.

Das Protokoll der Mitgliederversammlung vom 23. November 1996, veröffentlicht in grkg/H, Band 38, Heft 1, März 1997 und in einer kurzen Zusammenfassung in europa dokumentaro, Nr. 3, Februar /März 1997, wurde mit folgenden Änderungen in Absatz 2, letzter Satz einstimmig genehmigt:

"In Nitra hat eine Probe-SUS stattgefunden, SUS *16* wurde in Prag, SUS *17* in Rimini und San Marino veranstaltet."

Der Vorsitzende gab seinen Geschäftsbericht 1996 nebst einem vorläufigen Rückblick auf 1997 und Ausblick auf 1998 ab, der als Anlage zu diesem Protokoll genommen wurde. - Prof. Dr. B.-A. Wickström, Schatzmeister der AIS, gab seinen Kassenbericht 1996 ab. Diese Berichte wurden ausführlich diskutiert. Zu einer beschlossenen außerordentlichen Mitgliederversammlung am Samstagabend, des 21. Februar 1998 in Paderborn soll ein Budget 1998 vorgelegt werden, über das dann Beschluß zu fassen ist. Möglichst soll auch schon die Bilanz und Gewinn- und Verlustrechnung 1997 zur Genehmigung vorgelegt werden.

Herr Prof. Dr. Bormann legte den Prüfungsbericht der Revisoren für 1996 vor und beantragte, den Schatzmeister und den Vorstand zu entlasten. Die

Entlastungen wurden bei 2 Stimmenthaltungen erteilt.

Zum 21. Febr. 1998 soll der Vorstand die vereinsrechtlich nötige Neufassung der Satzung vorlegen, damit sie besprochen und eventuell schon verabschiedet werden kann. Alle effektiven und Fördermitglieder werden gebeten, lebenslange Mitglieder zu werden, um den Verwaltungsaufwand zu reduzieren. Alle im deutschen Sprachraum wohnhaften *lebenslangen* Mitglieder des ISK, IAK und ITK der AIS San Manrino, die dem AIS Deutschland e.V. noch nicht angehören, sollen zukünftig mit Rederecht zu den Mitgliederversammlungen eingeladen werden.
Alle Mitglieder der AIS Deutschland e.V. sollen gebeten werden, als tätigen Beitrag zur Sicherung der Dokumentationen der AIS-Tätigkeiten sich bei einer ihnen zugänglichen öffentlichen Bibliothek darum zu bemühen, daß dort die Quartalszeitschrift "grkg/Humankybernetik" geführt wird. Auf Antrag von Herrn Piotrowski wird der vorliegende Antrag dahin erweitert, daß zu Geschenk-Abonnements für Universitäts- und öffentliche Bibliotheken aufgerufen wird. Für die Spender-Abos sollen nur die zu den reinen grkg/H - Herstellungskosten (wie den Trägern der Zeitschrift) verrechnet werden.

Prof.Dr. Bormann stellte den Antrag, der Vorstand für 1998/99 möge, wie schon bei der Wahl für die Jahre 1995/96, aus drei Personen bestehen. Der Antrag wurde einstimmig angenommen.
Es erfolgten dann die Wahlgänge für den neuen Vorstand. Von den Fördermitgliedern wurde allein Herr Piotrowski vorgeschlagen und bei eigener Stimmenthaltung einstimmig gewählt. Er nahm die Wahl an. Im zweiten Wahlgang wurden von den wissenschaftlichen Mitgliedern die Professoren Dres. Frank und Wickström vorgeschlagen. Die Wahl erfolgte bei eigenen Stimmenthaltungen einstimmig; beide nahmen die Wahl an.

Es wurde festgestellt, daß dem Beirat satzungsgemäß die Professoren Dres. Fößmeier, Lanský, Maitzen, Quednau und Selten angehören. – Prof. Dr. Bormann bat, ihn aufgrund seiner angegriffenen Gesundheit als Aufsichtsrat zu entlasten. Dem entsprach die Mitgliederversammlung einstimmig. Als Kassenprüfer für 1997 und 1998 wurde bei eigener Stimmenthaltung einstimmig Prof. Dr. Jarmark gewählt.
Zum Tagesordnungspunkt Sonstiges stellte der Vorsitzende die geplanten AIS – Aktivitäten bei der Internationalen Begegnungswoche "Koexistenz – Kommunikation – Kooperation in Europa und der wissenschaftlichen Welt" (13. - 21. Febr. 1998 in Paderborn) vor. Für ergänzende Kursveranstaltungen innerhalb der 9. Deutschen AIS-Studientagung, mit welcher die Begegnungswoche vom 13.-18. Febr. eröffnet werden soll, meldeten sich die Professoren Dr. Bormann mit dem Thema ("Euro-Interlinguistik" – in ILo), Dr. Jarmark ("Mehrkanalmedien – Intermedia" – in Deutsch) und Piotrowski mit ("Europäische Institutionen" – in Deutsch). Drei weitere Kurse standen schon fest: Ein ILo-Schnellkurs als Demonstrationsmodell "Kiel instrui ILon rapide al sciencistoj?" (Frank), ein Kurs "Instrulingva kompetenteco kaj lernsukceso" (Dr.habil. Barandovská), "Europa turismiko" (OProf. Dr. Tyblewski), "Die neuen Medien als Instrumente der Kunst. Theorie und Praxis (Prof. Dr. H.W. Franke) und ein Einführungskurs "Elementoj de la Klerigkibernetiko" (Prof.Dr. Poláková). Das endgültige Programm der Studientagung, zu welchem der Vorsitzende noch weitere Kursangebote von Mitgliedern erhofft, soll am 16. Jan. 1998 zusammen mit dem Gesamtprogramm der Begegnungswoche auf Anforderung verschickt werden.
Weitere Wortmeldungen zu diesem Tagesordnungspunkt lagen nicht vor.

Paderborn, 1997 - 11 – 25

Siegfried Piotrowski (Protokollführer)
Helmar Frank (Vorsitzender)

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo.
Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. – Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". – Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. – En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). – Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". – En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 –1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. – Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". – Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 – 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.